Jarkolekto : 2012 | Numero : 2 | Paĝo : 1

# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri ***Senlime*** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

**Senlime**
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Bonvolu pagi, prefere antaŭ la jarfino, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La jara kotizo al ***Senlime*** (10 €) estas disigita de la abono al la papera versio de nia informilo (12€).

## ENHAVO :

**p. 1 : Trilanda renkontiĝo en Tongeren-o**
**p. 2 : Niaj programeroj lupee**
**p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2011-2012 (2/2)**
**p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo**
**p. 5 : Historio de Tongeren-o**
**p. 6 : Verviersa angulo : *Mijn vader is groot***

# ***Senlime***

**kaj la Esperantista Grupo Verviers**-a **invitas vin al**

# Trilanda Renkontiĝo en (BE-)TONGEREN

Dimanĉon, **la 22an de aprilo 2012 (10h00-17h30)**

**PROVIZORA PROGRAMO**

- 10h00 : malfermo de la akceptejo en gaŭlo-romia muzeo
- 10h45 : Vizito de la muzeo : Grupo A : (konstanta ekspozicio)
- Grupo B : Sagalassos (dumtempa ekspozicio)
- 12h30 : tagmanĝo en la gaŭlo-romia muzeo
- 14h45 : 5 km-promenado de la historia centro al *Beukenberg*
- 16h30 : kafumado kaj manĝeto en gaŭlo-romia muzeo
  http://www.tongeren.be/Toerisme (elektu vian lingvon)

Aliĝkotizo (ĉio enkalkulita krom tagmezaj trinkaĵoj): 30 EUR.

Bonvolu antaŭpagi la sumon da 30 EUR (partopreno + manĝo), NUR al la konto 979-5327148-10 de ***Senlime*** (pliaj detaloj ĉi-maldekstre).

Klare menciu la celon de via pago, kiu **nepre** alvenu plej malfrue la 15-an de aprilo : ĝi ebligas vian partoprenon (aliĝilo ne necesas – eventuala repago pro kiu ajn kialo principe neeblas). Indiku ankaŭ vian elekton (**A aŭ B**) por la muzeo. Bonvenon en Tongeren-o !

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

## Charles SCHRIEWER

Jam antaŭ la jaro 1908 Charles esperantiĝis. Li estis grava kunlaboranto de la franca profesoro Gustave Roy – iniciatinto de la projekto «***Amikejo***». Decideme li progresigis la lokan esperanto-movadon kaj iĝis la unua prezidanto de la iama esperantista grupo de **Amikejo**.

Li soldatiĝis en la kazerno de la 12-a linio en Chênée (urbeto apud Lieĝo), kaj iĝis membro de la belga taĉmento en Ĉinio. Li daŭrigis labori kiel delegito de U.E.A. Li instruis la Zamenhofan lingvon al belgaj kaj francaj soldatoj, eĉ al ĉinoj.



Leŭtenanto Charles **Schriewer**
1889-1916

Pro la unua mondmilito li forlasis Ĉinion por militservi en Afriko, kie li mortis en 1916.

**04-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***Charles Schriewer***".
Prelego de M. **Schrymecker**.
Inf. jacques@senlime.org

## Harry POTTER

La aventuroj de Harry POTTER ensorĉis miljonojn da legantoj kaj film-ŝatantojn en la tuta mondo : oni tradukis la librojn en multajn lingvojn, sed ŝajne jam ne estas esperanta traduko. Jam ekzistas 66 eldonoj en pli ol 60 diversaj lingvoj, inkluzive de la hispana, la franca, la kimra, kaj la latina.

En tiu-ĉi prelego nia nelacigebla serĉanto kaj nekutimema pripensanto, Charles NORGA dissekcos, elkriptigos kaj analizos la profundan signifon de la heroaĵoj de la juna sorĉisto. Li malkovrigos al ni konceptojn kiuj logos nin.

La diversaj libroj/filmoj de la serio Harry POTTER nepre metas nin antaŭ plej filozofiaj demandoj… Ĉu Hermiona estas feminista ? Kiel Aristoto estus direktinta Pudlard-on, la fama lernejo pri sorĉado. Ĉu magio kompateblas kun etiko ? Religio kun moralo ? Ĉu la ambicio estas virto ? Kiujn lecionojn instruas al ni la *Mortmanĝantoj* aŭ la *Terurigantoj* pri la feliĉo, la timo kaj la animo ? Kion rivelas la spegulo *Erised*-a ?

Jen prelego destinita al la multnombraj ŝatantoj de la sagao de J.K. Rowling, sed ankaù okazo revita por nin inici al filozofio. Bonvenon al ĉiuj !

«Ha, se ni estus havintaj tion en la Ateneo…! »

**05-18** 20h00 BE-Kelmis, Select: "Filozofia vidpunkto pri **Harry Potter**", prelego de Ch. **Norga**.
Inf. norga@senlime.org

## Karaoke de Senlime

Ja estas nun konate ke ***Senlime*** regule organizas sian propran karaokeo-n en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro. Kelkajn himnojn ni ankaù kelkfoje kantas okaze de festoj kiel la Zamenhofa en decembro, k.t.p.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaù havas grandan kulturan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande… kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Post plurjara sperto, Jean-Marie **Jacques** prezentis al ni en DVD kelkajn ekzemplajn karaokeojn de ***Senlime*** : temas nur pri kantoj el la «publika bieno», kio signifas ke ili estas libere uzeblaj sen aùtoraj rajtoj.

Se vi aliĝis/os al la yahoo-grupo «Amikejo» vi eĉ povas senpage elŝuti el ties dosiero «Fichiers» kelkajn el tiuj «karaokeoj de Senlime» kaj rekte uzi ilin per via komputilo.

Venu kanti (kaj ridi) kun ni : kiel kutime rajtos laŭplaĉe elekti kelkajn kantojn el nia ĉiam pli kaj pli vasta kolekto.

**06-18** 20h00 BE-Kelmis, Select: karaokeo de ***Senlime***.

Inf. lousberg@senlime.org

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2011-2012 (2/2)

***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

| | |
|---|---|
| **02-17** 20h00 BE-Kelmis, Select: ***debato pri la estonto de Senlime***. Inf. jacques@senlime.org | **17-02** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: ***débat sur l'avenir de Senlime***. Inf. jacques@senlime.org |
| **03-16** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***Kiel plurmaniere mi interesis miajn lernintojn***", prelego de Raymond **Demarche.** Inf. jacques@senlime.org | **16-03** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "***Comment j'intéressais de plusieurs manières mes élèves***", conférence de Raymond **Demarche.** Inf. jacques@senlime.org |
| **04-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***Charles Schriewer***". Prelego de M. **Schrymecker**. Inf. jacques@senlime.org | **20-04** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "***Charles Schriewer***", conf. de M. **Schrymecker**. Inf. jacques@senlime.org |
| **04-22** 10h00 BE-Tongeren, Galli-romia muzeo, ***Trilanda renkontiĝo***. Inf. jacques@senlime.org | **22-04** 10h00 BE-Tongeren, Musée Gallo-romain, rencontre des (espérantistes des) 3 pays. Inf. jacques@senlime.org |
| **05-18** 20h00 BE-Kelmis, Select: "Filozofia vidpunkto pri **Harry Potter**", prelego de Charles **Norga**. Inf. norga@senlime.org | **18-05** 20h00 BE-Kelmis, Select: "Point de vue philosophique sur **Harry Potter**" par Charles **Norga**. Inf. norga@senlime.org |
| **06-15** 20h00 BE-Kelmis, Select: karaoke de ***Senlime.*** Inf. lousberg@senlime.org | **15-06** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: karaoké de ***Senlime.*** Inf. lousberg@senlime.org |
| ✪ | ✪ |
| Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **07-20**, **08-17**, **09-21**, **10-19**, **11-16** kaj **12-09**. | Réunions suivantes au Sélect, La Calamine: **20-07, 17-08**, **21-09**, **19-10**, **16-11** et **09-12**. |

# Novaĵoj pri KELMIS✪.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

**Kinarto : triumfis la "Gigantoj" kaj "Rundskop" en Bruselo**

Belgio estas stranga lando. Se Bruĝo volas esti la Norda Venecio, Bruselo nun revas iĝi Norda Cannes. La dua solena festo pri la "Magritoj de l'kinarto", la premioj kiuj rekompencas la plej bonajn verkojn de la belga kinarto, ĵus okazis en la "Gold Hall" de l'skvaro sur la Monto de l'Artoj en Bruselo, ĉeeste de multnombraj gravuloj de la kinarta industrio belga.

La fratoj Dardenne, François Damiens, Buli Lanners, Jonathan Zaccaï, Nathalie Baye, Yolande Moreau, Jérémie Renier kaj ekzemple Virginie Efira surtretis la bluan tapiŝon surmetitan sur la ŝtupoj de la ĝardenplaco.

Pluraj politikistoj kiel la Unua ministro Elio Di Rupo kaj la ministro pri eksterlandaj Aferoj Didier Reynders aŭ la ministrino pri Kulturo, Fadila Laanan, ankaŭ partoprenis. Eĉ la reĝa familio estis reprezentita de la princo Laurent kaj la princino Klara.

Sume, 19 "Magritoj" estas atribuitaj fine de ceremonio prezidita de la franca realigisto Bertrand Tavernier kaj duanfojon prezentita de la aktorino kaj realigistino Helena Noguerra.

Du filmoj, unu flandra kaj unu valona (kiel decas en nia teorie dulingva lando), "Rundskop" de Michael R. Roskam kaj "Les Géants" de Buli Lanners, naskiĝinta lime de nia Amikeja regiono. Lia filmo estas premiita pro plej bona filmo, plej bona realigisto, plej bona muziko kaj plej bona bildo !

**Libro : Der Bärrech – die Neutralität - der Schmuggel**
**[La mineja teramaso, la neŭtraleco, la fraŭdo]**

Iwan **Jungbluth**

29,7X21cm, 220 paĝoj, 29 EUR.

Sub tiu titolo la muzeon pri la valo de l'rivero "Gueule" (Kelmis, 087/657504) ekspoziciis la bazon de libro de Iwan Jungbluth memoriganta pri la iama teritorio de Neŭtra Moresneto kaj ĝia historio ĝis la foriro de la societo «La Vieille Montagne» en 1951.

La libro rememorigas pri la teramaso, simbolo de prospera industrio kiu igas la enloĝantojn de la ejo privilegiulojn kompare kun la kolegoj en la minejoj de la Lieĝa baseno. Estas la epoko kiam la turo kiu superstaras la ejon montras tri malsamajn horojn, tiun de Prusujo, tiun de Belgio kaj tiun de Nederlando.

La neŭtraleco estis grava atuto por la disvastiĝo de Neŭtrala Moresneto sed la proksimeco de la landlimoj ankaŭ faciligis grandskalan fraudon.

Tiu neŭtraleco ankaŭ instigis la konatan (de ni) projekton pri esperanto-ŝtato.

La ekspozicio prezentis la libron «La mineja teramaso, la neŭtraleco, la fraŭdo», ja verkita en la germana lingvo, sed riĉa je centoj da atentindaj bildoj.

Vendo: Grenz-Echo
Marktplatz 8,
4700 Eupen - Belgio
Tel.: +32 87 59 13 03
Faks: +32 87 74 38 20
guido.bertemes@grenzecho.be
(http://grenzecho.net/gev/books_detail.asp?b=214)

**OpenBorders MBA**

La 26an de januaro, la rektoroj de la universitatoj en Liegho, Hasselt kaj Akvisgrano oficiale lanĉis en Eupen, ĉefurbo de la germanlingva Komunumo de Belgio, multlingvan programon "Open-Borders MBA". Tiu altnivela "Master" ekos en septembro 2012.




Ĝia celo estas helpi la entreprenestrojn plikreskigi sian kompetenton baze de sia komuna sperto, apogante sin sur la avantaĝoj de centra situacio geografia kiu enhavas kvin regionojn, tri lingvojn, kvar milionojn da enloĝantoj kaj 250000 entreprenojn. La kursoj okazos en kvar lingvoj (NL, FR, DE, EN) kaj estas gvidotaj de profesoroj el la tri landoj.

"*Ne ekzistas pli strategia loko por organizi tian programon ol la centro de regiono je malfermitaj landlimoj*", diris la Ministro-Prezidanto Karl-Heinz Lambertz.

# Historio : TONGEREN

## Komence

La urbo ***Tongeren**o* unuafoje aperas en la historiaj libroj sub la nomo ***Atuatuca Tungrorum****,* kiel la romianoj nomis la administran ĉef-urbon de la distrikto (***civitas***) de la ***Tungr**oj*, ununura nomo de pluraj lokaj popoloj. Tiuj-ĉi jam plurfoje rebelis kontraù la romiaj invadintoj. Sed Ĵulo ***Cezar**o* submetis ilin kaj la imperiestro ***Aùgusto*** kunigis ilin en sama administra unuo, al kiu apartenis ankaù la ***Eburon**oj*.

## La romia urbo

Unue nur vilaĝo (***vicus***) kruciĉe de gravaj vojoj, ***Atuatuca*** iom post iom iĝis romia urbo fortika (***municipium***)**.**

## La romiaj ramparoj

La romiaj urboj distingiĝas pro siaj imponaj muregoj. Tiuj-ĉi ĉirkaùis tipan miksaĵon de publikaj konstruaĵoj kaj privataj domoj, intertranĉitaj de stratoj kaj placoj. Sed… la diversaj ĝermanaj popoloj el la **Gaŭl**a nordo deziregas la urbon. Ĝi do ĉirkaùigas sin per novaj remparoj, malpli longaj, garnitaj per defendo-turoj.
La romia kulturo prosperas ne nur interne de la remparoj : en la ĉirkaŭa kamparo, la riĉaj kampar-anoj konstruas farm-domojn (**vila**oj) kaj funebrajn teramasojn (**tumul**oj), laŭ la romia modelo.



## Kristana diocezo

En la plej malfrua romia epoko, la civito de la Tungroj, kiel Kolonjo kaj Trevo, iĝas diocezo (kristana episkop-lando).
La sanktuloj **Materne** kaj **Servais**, la unuaj predikantoj, tie instalas sian episkopejon. La arkeologiaj prifosaĵoj faritaj en la historia koro de la urbo, la apudaj nekropoloj (tombejegoj) kaj la kamparo, malkovris postrestaĵojn, kiuj donas vivantan bildon pri la romia pasinteco de la urbo.

## Mezepoke

El la **Merovingi**a epoko (5–7a jarcento) ne postrestas multo en Tongeren. Sed dum la epoko de Karlo-la-granda (8a–9a jarcento), nova preĝejo kaj ĉapitro (kanonikaro) aperas. Konforme al la tradicio, preĝejo kaj ĉapitro situas loke de la nuna Dipatrina baziliko. Antaùe estis tie la preĝejeto Sankta Materne (preĝejeto Memoriga) kaj la iama episkopejo. Tiuj ekleziaj havaĵoj (monaĥejo) konsistigas la bazon de la posta urba disvolvo.

## Gotika arkitekturo

Dum la unua duono de la 13a jarcento stariĝas, laù gotika stilo, la nuna Dipatrina baziliko, surloke de la iama romanika katedralo. Samtempe komenciĝas la rekonstruado de la romanika klostro, kiu postrestas hodiaù. Ĉirkaŭ la iama urbo-centro, novaj komercaj kvartaloj, sanigejoj kaj metiistaj kvartaloj disvolviĝas. La plilarĝigo de la ĉirkaŭmurego ebligas akcepti ankaù monaĥejojn, paroĥajn preĝejojn kaj beginejon.

## Lieĝa Princ-episkopo

Poste sekvas malserena periodo por Tongeren. La urbo tamen restas unu el la «bonaj urboj» de la Lieĝa Princepiskopejo. Sed en 1677 la trupoj de Ludoviko la 14a sieĝas la urbon kaj preskaŭ tute forbruligas ĝin. Bato pro kiu la urbo nur tre malfacile restariĝos.

## Renaskiĝo

150 jarojn poste, la urbiĝo retrovas sian rapidon. Tiu kresko samtempas kun la kreado de la belga ŝtato en 1830. La imponaj burĝaj restadejoj atestas pri la riĉeco de la nova ŝtato.
Entuziasme la popolo klopodas forĝi al si propran identecon. La verkistoj kaj «historiistoj» tiam kunigas heroajn legendojn kiuj surhavas ekzemplan valoron. Tiel ***Ambioriks**o* (ĉefo de la ***Eburon**oj*) subite iĝas heroo, ne nur en sia urbo, sed nacinevele.



*Ambioriksa statuo en Tongeren*

Laŭ FRanclingva dokumento :
«LA ROUTE D'AMBIORIX»
aĉetebla (ankaŭ NL k. DE) ĉe
Turism-oficejo de Tongeren
Tel. +32 12 39 02 55.

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

# MIJN VADER IS GROOT

ou Comment je suis devenu un con qui ne parle pas le néerlandais

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
Jean-Pol Sparenberg
20 Ruelle de Thuin
6540 LOBBES
Tél. 071/59.15.42

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année une ou plusieurs des cotisations suivantes au compte

**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*La cotisation de **Senlime** est obligatoire et fixée à 10 EUR. Ce bulletin d'information est intégré à la revue «Espéranto en marche», comprise dans la cotisation à APE.*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2012** (EGV) **25 €**
**U.E.A. 2012** (MA-T) **61 €**
***Senlime*** **(cotisation 2012) 10 €**

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant ainsi que l'association bénéficiaire: *«cotisation de.... pour....».***

**MIA PATRO ESTAS GRANDA aù Kiel mi iĝis stultulo kiu ne parolas la nederlandan**

En tiu plej interesa libro, kiu ridigos nin (eble krom la responsuloj en la instruada medio!) la aŭtoro, Dominique Watrin, pritraktas la demandon : "Kial franclingvanoj tiugrade estas fermitaj al la uzo de la nederlanda lingvo, dum la flandranoj inverse pli-malpli sukcese uzas la francan ?".

Tamen, kiom longe, en lernejoj, ili lernis la nederlandan ! La aŭtoro lernis dum ses jaroj en la unuagrada lernejo, ses jaroj en la duagrada, kaj kvin jaroj en la universitato, por katastrofa rezulto : li nek komprenas, nek legas, nek parolas la nederlandan. Kaj tamen li akiris bonajn poentojn, kion oni atendis de li !

Dominique Watrin rakontas tiujn horojn pasigitajn (aŭ perditajn) por klopodi majstri tiun lingvon, kiun oni nepre konu. Dum 17 jaroj, li kuraĝe baraktis por havigi al si la gorĝajn ruktojn de tiu idiomo pri kiu Jacques Brel diris ke oni ĝin bojas pli ol parolas.

Kaj la konstato estas evidenta : tiuj horoj pasigitaj por komenti la staturon de la patro estis vanaj, malgraŭ diversaj pedagogiaj eksperimentoj, li restis stultulo kiu ne parolas la nederlandan. Tamen li bone fartas !

Le libro estas vendata por 15 € de la Eldonejo "Cactus inébranlable" [Neŝancelebla kakto]. Tél. 0032 497 76 35 55

**MON PERE EST GRAND ou Comment je suis devenu un con qui ne parle pas…**

Dans ce livre des plus intéressants, qui nous fera rire (sauf peut-être les responsables de l'Enseignement), l'auteur traite de la question : "Pourquoi des francophones sont-ils à ce point fermés à l'emploi de la langue néerlandaise, alors que les flamands à l'inverse utilisent avec plus ou moins de succès le français?"

Pourtant, ils ont appris le néerlandais à l'école pendant tant d'années ! L'auteur a fait six ans dans le primaire, six ans dans le secondaire et cinq ans à l'université, pour un résultat catastrophique : il ne comprend pas, ne lit pas, ne parle pas le néerlandais. Et pourtant, il a eu de bons points, ce qu'on attendait de lui !

Dominique Watrin relate ces heures d'école passées à tenter de maîtriser cette langue qu'il fallait absolument connaître. Pendant 17 ans, il a tenté d'intégrer les rots gutturaux de cet idiome dont Brel disait qu'on l'aboie plus qu'on ne le parle.

Et le constat est évident : malgré ces heures passées à commenter la taille du père, malgré diverses expériences pédagogiques, il est resté un con qui ne parle pas le néerlandais. Pourtant, il va bien !

Le livre est vendu 15 € par les Editions "Cactus inébranlable".
Tél. 0497/7635 55